

# OKCIDENTGERMANA REVUO

N-ro 1 · Januaro/Februaro 1968

Oka Jarkolekto

1 Y 21479 F

## En la Jaro de la Homaj Rajtoj

Unuiĝintaj Nacioj restas espero por homoj kaj ŝtatoj

Proklaminte la jaron 1968 Jaro de la Homaj Rajtoj, Unuiĝintaj Nacioj alvokis ĉiujn membro-ŝtatojn al novaj klopodoj por certigi, ke ĉiu ekposedu la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. Pli ol antaŭe Unuiĝintaj Nacioj konsciis la grandan komunan respondecon pri plena apliko de la postuloj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Eksterdube en tiu ĉi mondo unu el la plej gravaj taskoj estas senlime validigi la homajn rajtojn. Sur tiu ekkono certe ankaŭ baziĝis la unuanima decido de la Ĝenerala Asembleo de UN en aŭtuno 1965 sekvi la rekomendon de la Socia Konsilantaro kaj nomi la jaron 1968 Jaro de la Homaj Rajtoj. Dum tiu ĉi jaro estas la 20a datreveno de la decido de UN pri la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Jam dum solenaĵo okaze de la Tago de Homaj Rajtoj la 10an de decembro 1967 la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN, la rumana ministro pri eksterlandaj aferoj Manescu, koncize prezentis programon kaj celon por la Jaro de la Homaj Rajtoj. La homaro laŭ li ne povos progresi, se ne rigore estos observataj la personeco de ĉiu individuo kaj ĝia rajto decidi pri sia propra sorto kaj esti mastro en sia propra domo. Oni ĉesu altrudi fremdan volon al aliaj popoloj. Manescu aldonis, ke premiso por ke ĉiu povu ĝui la fruktojn de sia laboro estas sendependa ekonomia evoluo.

De tiuj altflugaj celoj la hodiaŭa mondo ŝajnas troviĝi pli malproksime ol iam antaŭe. Manescu preterlasis, evidente pro diplomataj konsideroj, atentigi pri tiuj landoj, en kiuj la homaj rajtoj estas limigitaj de la propraj registaroj.

Por multaj homoj en mizero, sed ankaŭ por premegataj ŝtatoj, Unuiĝintaj Nacioj restas ankoraŭ espero. Ili fidis pri UN, kvankam ilia pacienco ĉiam denove estis konsiderinde multuzata. Por milionoj da rifuĝintoj, sed ankaŭ por tiuj, al kiuj doni la homajn rajtojn en ilia plena amplekso rifuzas la propraj registaroj, la Jaro de la Homaj Rajtoj povos alporti esperon nur, se la mondorganizaĵo ne kontentigas pri nura alvoko, sed se ĉiu membro-ŝtato ekkonscias pri la celoj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj agas laŭ tio.

Ni do esperu sukcesojn de la internacia konferenco, al kiu Ĝenerala Sekretario U Thant invitis 130 naciojn — de la 22a de aprilo ĝis la 12a de majo en Teherano. Tiu konferenco de UN, kulmino de la Jaro de la Homaj Rajtoj, ellaboros rekomendojn pri la estonta agado por realigi la homajn rajtojn tutmonde.

**Kontraŭ aspektoj de ŝovinismo** la socio en Federacia Respubliko Germanio posedas sufiĉe da rezistokapablo. Tion deklaris la ministro pri eksteraj aferoj Willy Brandt (en la bildo dekstre, kun sia luksemburga kolego Pierre Grégoire) okaze de „Ekzila Kunveno“ en Luksemburgo, kiu estis ligita kun ekspozicio pri germana literaturo en ekzilo (1933—1945). Inter la elmigrintoj, kiuj sekvis la inviton de la germana ambasadoro Lueders al Luksemburgo, troviĝis Golo Mann, Eva Reichmann, Richard Friedenthal kaj Max Horkheimer. La filo de Thomas Mann konfesis: „Mi kredas, ke la fortoj kaj celadoj en Germanio, kiuj estas laŭtempaj, kiuj taŭgas kaj utilas al la nacio mem kaj al ĉiuj ĝiaj najbaroj ĉirkaŭe, estos pli potencaj ol la fortoj de malnovaj orgojlo, blindeco kaj malico.“



# Paca utiligo de nuklea fiziko

## Konturoj de la tria atoma programo en Germanio

Jam konturiĝis tria germana kernfizika programo laŭ siaj taskoj. Ĝia unuaranga celo verŝajne estos longdaŭra prizorgado de la Federacia Respubliko per kernenergio. En tiu ĉi programo antaŭ ĉio disvolviĝos la ĝis nun malmulte atentata radiada kaj radiokemio. Temas pri la brulaĵo-cirkulado de la elprovitaj reaktoroj kaj de la rapidaj kovreaktoroj. La ekspertoj ĉefe okupiĝos pri la kemio kaj teknologio de la transplutoniaj elementoj kaj de la plutonio mem. Tiurilate grava estas la ekzamenado de la radioaktivaj fendproduktoj kiel stroncio, cezio kaj prometio rilate ilian utilon. La signifo de la radiokemio por la kuracistaj bezonoj, kiel ekz. la steriligo de kudromaterialo, kiel ankaŭ la steriligo de nutraĵoj, ĝenerale estas konata, sed estos esplorata en multaj detaloj.


Ĉar la varmegvaporka reaktoro en Großwelzheim (Heslando) kaj la kompakta natrie malvarmigata kernenergia instalaĵo en Karlsruhe (Badeno) jam estas enmetitaj en la kovreaktoran programon, en estonteco temas pri la kolektado de spertoj, unue per provizo per la malrapida *core*, poste per la rapida. *Core*, esenca konsistaĵo de kernreaktoro, estas kaldrono, entenanta la reaktoran brulaĵon kaj en kiu okazas la kernreakcio. Ankaŭ al la evoluigado de alttemperaturaj reaktoroj estos dediĉita granda atento. Tiu ĉi progresinta reaktora tipo estos rigardata konekse kun fermita gasturbino. La nocio brulaĵo-cirkulado kovras aron da problemoj, kiuj estos alfrontataj same en la tria programo: longdaŭra sekurigo de nuklea brulaĵo, la reparaĵo de radiitaj brulelementoj, la t. n. brulelementa pretigo kaj fine la fina stokigo de altaktivaj defalaĵoj. Ekspertoj komprenas sub brulaĵele-

mento bastoneton el kernfenda materialo en unu aŭ pluraj aluminiuj kovroj, kiu estas enigata en la reaktorojn, kie tiam sub forta fluo de neŭtronoj malvolviĝas la kernfendado, la t. n. kernbruligado.

En la tria programo oni pensos ankaŭ pri akcelilo por pezaj jonoj, kiu malfermus novajn terenojn al la malaltenergetika kernfiziko kaj krome ebligu novtipajn eksperimentojn al la esplorado de duraĵoj, al la radiada kemio kaj eĉ al la radiada biologio, grava tereno. Duraĵoj estos ekzamenataj ankaŭ helpe de neŭtronaĵoj. Multspecaj estas la eksperimentoj en la plasmofiziko sur kernenergetika bazo, kiel la esplorado de rapidaj magnetaj kompresioj kaj de la stabileco-rilatoj; sur tiu kampo la germanoj jam faris sukcesajn esplorojn.

Kiel novaj grandstilaj aparataroj por la tria programo antaŭvidataj estas la konstruo de lineara akcelilo kaj de provizejaro en Hamburgo-Bahrenfeld kaj la instalado de altakcelilo por protonoj, jam de longe postulata. Verŝajne ĝuste tiu ĉi protonakcelilo estos konstruita surbaze de internacia kunlaboro. Kompreneble en la tria programo partoprenos ankaŭ la grandaj germanaj firmoj, Siemens, nun konstruanta la elektrejon Stadersand (Holstinio), kaj AEG, transpreninta la komision konstrui la elektrejon Würgassen (Bavario). Tiuj du germanaj kernelektrejoj kun elektra kapacito de po 600 mega-ŭatoj estos ekipitaj per malpezakvaj reaktoroj. Per tio la Federacia Respubliko decide progresis sur la vojo de ekonomia utiligo de la kernenergio. La tria programo, kiel ajn skize konata, metos Germanion en la unuan vicon de scienco kaj tekniko sur tiu ĉi sendube multekosta kampo.

De du jaroj nun funkcias en Surinamo tiu generatora statoro, kies rotor kun 240 rotacioj po minuto produktas kaj transdonas al la kurenta reto elektran povumon de 40250 kilouat-ampero. La entrepreno Siemens konstruis entute ses tiajn generatorojn por la elektrejo Brokopondo en Surinamo. En la landoj de Sudameriko la akvoforta potencialo estas nur malmulte utiligita, tiel ke la ekspluato de tiu energifonto ne prezentas tro grandan problemon.



## Helpe al vietnamaj infanoj

La 4an de decembro 1967 la dana kargoŝipo *Pasadena* forlasis la havenon de Bremen. Ĝia celo estas Sajgono. Surŝipe troviĝas — en kestojn enpakitaj — pretaj konstrupartoj por „SOS-infanvilaĝo“ en Suda Vietnamo. La vilaĝon oni konstruos du kilometrojn de Sajgono, en Go Vap. La fundamentoj por 41 domoj de la infanvilaĝo jam estas pretaj. Al 600 ĝis 700 infanoj perdintaj siajn gepatrojn pro la vietnama milito tiu vilaĝo ek de la somero de la venonta jaro donos novan hejmon.

Civitanoj de FRG dum malmultaj semajnoj donacis kvar milionojn da GM por la vilaĝo. Tion sciigis D-ro Hermann Gmeiner, la „patro“ de la SOS-infanvilaĝoj. Jam ekzistas 64 infanvilaĝoj en 26 landoj. La „SOS-Infanvilaĝa Asocio“ posedas membrojn en la tuta mondo, entute estas pli ol du milionoj. Tamen la historio de tiuj infanvilaĝoj estas tute freŝdata. En la jaro 1949 la aŭstra medicina studento Hermann Gmeiner kun kelkaj amikoj kaj komenca kapitalo de 600 ŝilingoj (ĉ. 100 GM) iniciatis la unuan SOS-infanvilaĝon. Ses jarojn poste fondiĝis

en Munkeno la unua germana SOS-Infanvilaĝa Asocio, kiu hodiaŭ havas en FRG multe pli ol duonan milionon da membroj, dekunu pretajn infanvilaĝojn kaj du pliajn planatajn.

La infanvilaĝa movado konsideras sia tasko krei novan hejmon por orfaj, senradikiĝintaj aŭ medi-damaĝitaj infanoj. De la bebaĝo ĝis sia 14a jaro ili trovas akcepton en la vilaĝoj. Ili estas kunigitaj, laŭeble bone miksitaj, en familiojn de ok ĝis naŭ personoj. Estro de tia familio, kiu loĝas en unu domo de la infanvilaĝo, estas edukistino, kiu en patrina lernejo de la Asocio estas preparita por sia tasko. La rolon de la patro transprenas por ĉiuj familioj la vilaĝestro.

## Partopreno en ESRO-programo

En la kadro de la programo de la Eŭropa Organizaĵo pri Kosma Esplorado (ESRO) fine de oktobro 1967 estis sukcese katapultita german-svisa *Zenit*-raketo. Ĝi atingis alton de 145 km. La raketo, konstruita de la entreprenoj *Dornier* en Munkeno kaj *Contraves* en Zuriko, havis kun si sciencajn mezurilojn de svisaj kaj germanaj institutoj. Ĝi havis longon de 5,6 m kaj laboris per durmateria motoro. La pezo de la instrumentoj estis 25 kg. Celo de la eksperimento estis la mezurado de la kemia konsisto, de la temperaturo kaj de la molekula pezo de la alta atmosfero kiel funkcioj de la alto, de la tagotempoj, de la geografiaj latitudoj kaj de la suna aktiveco.

La raketo estis katapultita de Salto de Quirra en Sicilio, dum per paralelaj eksperimentoj en la norvega loko Andya estu ebligita konkludoj pri la energi-bilancio de la alta atmosfero. Partoprenas la teamo por kosmesploro ĉe la Fizika Instituto de la Universitato de Bonn, la Jonosfera Instituto de Breisach kaj la Max-Planck-Instituto pri Kernfiziko de la Universitato de Heidelberg. La instituto de Breisach havas kiel taskon la esploron de la elektrona denseco. La eksperimentoj estas subvenciataj de la Federacia Ministerio pri Scienca Esploro.

## Pli kaj pli grandaj petrolŝipoj al Wilhelmshaven

La petrolkajo en Wilhelmshaven estontece povas esti frekventata de petrolŝipoj ĝis 120 000 tunoj, kiel komunikis la Oficejo de Akvo kaj Ŝipveturo en Wilhelmshaven. La ŝipvojoj de Jade post dragaj laboroj por pliprofundigi la veturkanalon estis disponigita por ŝipoj subakvaj je 50 futoj (15,24 m). La ĝisnuna limo estis ĉe 14,60 m.

Jade, kiu jam nun havas la plej profundan veturakvon de ĉiuj grandaj marhavenoj, en la nuna jaro estos pliprofundigita por ebligi — ĉe profundeco de 18,8 m — al petrolŝipoj ĝis 175 000 tunoj la albordegon ĉe la frajtokajo de Wilhelmshaven.

---

*La redaktoro de OGR ricevis okaze de la festotagoj tutan aron da bondeziroj. Ne povante skribi al ĉiu, li ĉi-loke esprimas sian grandan dankon.*

*Al ĉiuj niaj estimataj legantoj ni deziras sukcesan kaj prosperan Novan Jaron.*

# Helpo el FRG

● *La agado de germanaj konstrufirmoj* en eksterlando prezentas broŝuro de la Ĉefunuigo de la Germana Konstruindustrio. Laŭ tio inter 1950 kaj 1966 germanaj konstrufirmoj ricevis el 82 landoj entute 1064 komisionojn. Multe partoprenas 62 evoluantaj landoj, ĉefe en Azio, kies mendovaloro atingas 49%.

● *Akordiĝon pri evoluhelpo* ankaŭ kun la landoj en Orienta Eŭropo sugestis la ministro pri ekonomia kunlaboro, Hans-Jürgen Wischnewski, malfermante la migrantan ekspozicion *Intercop 67* en Hannover. La tempo de eksperimentoj pasis, li diris, aldonante, ke oni ne provu fari malvarman militon per evoluhelpo. Ĉi-jare la Federacia Respubliko donos 2,9 miliardojn da GM.

● *Friedrich-Ebert-Fondaĵo*, socialdemokrata institucio, dum konferenco en Tokio, kiun partoprenis ok aziaj ŝtatoj kaj sep internaciaj organizaĵoj agantaj en Azio, promesis al la evoluantaj landoj helpon en evoluigo de iliaj amaskomunikiloj.

● *La plej granda plenkontenera ŝipo* de la mondo, unua en serio de kvin 27 000-tonelaj ŝipoj, estas finkonstruata en la ŝipfarejo de la hamburga uzino Howaldt. Ĝi estis mendita de la brita *Overseas Containers Ltd.* La enakvigo estas antaŭvidita por majo 1968.

● *Je 30 milionoj da GM* sumiĝas komisiono pri livero de sterkuzino al Turkio, kiun ricevis la firmo *Chemiebau Dr. A. Ziehrer* en Kolonjo. La uzino ekfunkciu meze de 1969 en Samsun (Nigra Maro). Ĝi havas kapaciton de pli ol 70 000 tunoj da fosforacido pojare.

● *Du milionoj da vestaĵoj* ĝis nun donacis por palestinaj rifuĝintoj la loĝantaro de la Federacia Respubliko. La registaro transprenas la — tre altajn — kostojn de transportado. Por la Palestina Helpfondaĵo de Unuigintaj Nacioj FRG, ne estante membro de UN, konsentis pagi kotizon de unu miliono da usonaj dolaroj.

● *Nobelpremiito Profesoro Manfred Eigen* donace ofertis al la Hebrea Universitato en Jerusalemo projektitan de li temperatursaltan instalacion por mezurado de temperaturo ĉe ekstreme rapide okazantaj kemiaj reakcioj. Profesoro Eigen, aganta direktoro de la Max-Planck-Instituto por fizika kemio en Göttingen, vizitante la analogan instituton en Jerusalemo estis forte impresita de la tie farata laboro.

● *En Etiopio, Kenjo kaj Nigero* pliajn afrikajn filiojn establis la farbofabrikoj *Bayer AG*, Leverkusen. Jarkomence ekproduktis *Bayer Ethiopia Ltd.* en Addis Abeba, *Bayer East Africa Ltd.* en Nairobi (por Kenjo, Tanzanio kaj Ugando) kaj *Bayer Nigeria Ltd.* en Lagos. La vendoj de Bayer en tuta Afriko dum la pasintaj tri jaroj plialtiĝis je ĉ. 50%; la kresko en 1967 estas nomata supermeznombra. — En Supra Voltao, plagata de bestmortado kaj misrikoltoj, pro akvomanko laboras inĝenieroj kaj teknikistoj de germanaj firmoj, kuracistoj, instruistoj kaj junaj volontuloj de Germana Evoluservo, kiuj trejnas junajn afrikanojn. Lernejoj por administraciaj oficistoj kaj fleĝistinoj estis konstruitaj de FRG kaj subtenataj de Eŭropa



„Ni estas la plej ina teamo de la mondo“, asertas la inoj de la germana skiteamo pri si mem. Kiel bone harmonias atrakcia aspekto kaj kvalita sporto, pravas tiu grupfoto de la skiistinoj, de maldekstre: Rosi Mittermaier (17), Christl Loferer (15), Martha Vogl (22), Christa Hintermaier (21), Burgl Färbinger (21), Christl Laprell (17), Traudl Walz (19), Margarete Hafen (21) kaj Traudl Treichl (17). En la germana delegacio por la Olimpiaj Vintro-ludoj en Grenoble troviĝas Burgl Färbinger, Margarete Hafen, Christl Laprell, Rosi Mittermaier, Christa Hintermaier kaj Traudl Walz.

**Ekonomia Komunumo.** Kreiĝis bonaj antaŭkondiĉoj por formiĝo de meza tavolo. — Centro pri ekonomiaj kaj sociaj studioj en Okcidenta Afriko, fondita de la Federacia Respubliko, servas al anoj de multaj afrikaj ŝtatoj; ĝi kondukas al grado, egala al ses jaroj en germana gimnazio.

- *Deutsche Welle* (Germana Ondo), kurtonda stacio elsendanta al ekstereŭropaj landoj, interkonsentis kun *Radiodiffusion Nationale* de Gvineo pri intima kaj amika kunlaboro.

- *Jam antaŭ cent jaroj* la germana firmo Siemens konstruis la telegrafan linion Londono-Kalikato, 11000 km longan. Tiun jubileon oni memoris dum la malfermo de la nova uzino de *Siemens of India* ĉe Bombaĵo. La fabriko produktas motorojn kun kapacito de ĝis 22 kiloŭato kaj kun magnetkupliloj.

- *Sraŭbkompresorojn* estonte komune konstruos *Gutehoffnungshütte Sterkrade AG* en Oberhausen kaj la japana pezindustria societo *Išikaŭajima-Harima* en Tokio, kiuj faris kontrakton pri kunlaboro. Oberhausen liveros spertojn kaj la verajn kompresorojn, kiujn la japana entrepreno muntos kaj disvastigos en Orienta Azio. Temas jam pri la dua tiaspeca kontrakto de la germana uzino: Antaŭ du jaroj ĝi interkonsentis kun kompanio pri pneŭmatikaj instrumentoj en Ĉikago, sekve de kio la germanaj ŝraŭbkompresoroj eniris plurajn usonajn industriajn entreprenojn.

- „*Klinobox*“, kiun eblas transformi al plenekipita operaciejo, apartenis al transporto ekspedita fine de decembro de Hannover al la Ruĝa Kruco de Norda Vietnamo. Krome estis senditaj 60 lazaret-litoj. La sendaĵojn ebligis donacoj de ruĝkrucaj societoj kaj de privataj okcidenteŭropaj. La transporto okazis per vagonaro ĝis Vladivostok kaj de tie ŝipe al Hajfongo, kie ĝi alvenis fine de januaro.

## Kion kaj kiom kolektas

### la Germana Biblioteko

600000 librojn kaj mapojn kolektis la Germana Biblioteko en Frankfurto dum la pasintaj dudek jaroj. Tio evidentiĝas el broŝuro eldonita de la germana librokomerco „Libro kaj librokomerco en nombroj“.

Laŭ tiu bilanco la Biblioteko nombris fine de 1966 597642 librojn kaj mapojn. Kompare kun la antaŭa jaro la nombro de titoloj kreskis je 29272, tiu de volumoj je 45080. La disponataj periodaĵoj atingis fine de 1966 provizon de 26835.

La kolekto de universitataj verkoj ampleksis samtempe 132216 titolojn, la literaturo de germanaj elmigrintoj 10062 volumojn. Plia kolekto de la Biblioteko enhavas fremdlingvan literaturon pri Germanio kiel ankaŭ tradukojn de germanlingvaj verkoj. Tiu komencita en 1963 kolekto nombris 4197 volumojn.

Ankaŭ la eldonoj de literaturaj verkoj sur diskoj estas kolektataj en la Biblioteko. Tiu diskoteko havis fine de 1966 amplekson de 955 titoloj sur 1152 diskoj. Aldone la Biblioteko donas bibliografiajn informojn: En 1966 eniris ĉ. 48000 informpetoj, el kiuj preskaŭ 2500 venis el eksterlando.

Kiel centra librejo de la Federacia Respubliko kaj kiel arkivo de la germana librokomerco la Germana Biblioteko en Frankfurto daŭrigas por FRG la laboron de la Germana Librejo en Leipzig. Ĝia tasko estas kolekti, registri kaj havi je dispono la aperintan post la 8a de majo 1945 german- kaj alilingvan literaturon enlandan, la germanlingvan literaturon el eksterlando, fremdlingvan literaturon pri Germanio kaj tradukojn de germanaj verkoj.

## Historiistoj kritikis instrulibrojn

La germanaj kaj ĉeĥoslovakaj instrulibroj pri historio ne trovas plenan aprobon de la historiistoj. Al tiu konkludo venis germanaj kaj ĉeĥoslovakaj historiistoj, unuafoje kunvenintaj por kontroli la instrulibrojn de ambaŭ landoj. Dum sia tritaga konferenco en la Internacia Lernejlira Instituto en Braunschweig ili kritikis, ke en la germanaj instrulibroj ne sufiĉe konsiderata estas la estiĝo de la ĉeĥoslovaka nacia movado en la 18a kaj 19a jarcentoj en ligo kun samaj celadoj en aliaj eŭropaj ŝtatoj. Per tio — laŭ la historiistoj — fariĝas facile nekomprenebla por germanaj infanoj la origino de la ĉeĥoslovaka ŝtato post la Unua Mondmilito. En ĉeĥoslovakaj historiaj libroj oni konstatis foreston de diferencigo de la germana socia historio antaŭ la Reformacio.

Similaj esploroj kaj kunvenoj, kies konkludoj cetere estas daŭre realigataj, okazas en Braunschweig jam de aro da jaroj. I.a. decidis germanaj kaj francaj instancoj utiligi instrulibrojn de la respektiva alia lando por la propra instruado.

## De grandurbo al kibuco

**Reuven Kritz: Freŝa mateno.** El hebrea lingvo tradukis Ota Ginz. 281p. Eld. Libroj „Pura“, Kirjat Mockin, Israelo, 1967. 1,80 us. dol.

Kiam vi estos leginta ĉi tiun libron, vi eble ankoraŭ poste repensos pri tiu kibuco, en kiu vivis Rafi inter kaj kun aliaj geknaboj. Ili ne estas iaj „herooj“, kvankam ili mem kelkfoje kredas tion; ili studas en sia „kvuca“ (grupo) diligente dum la antaŭtagmezo, kaj posttagmeze ili efektivas siajn personajn planojn kaj (mis)intencojn. La aŭtoro donas al ni la okazon partopreni en iliaj infanaj entreprenoj, speciale en tiuj de Rafi, kiu ja estas, por tiel diri, la ĉefulo de la rakonto. Li havas, propradire, du vivojn: La komencon li pasigas en aŭstra grandurbo dum la tempo de la jam minacanta nazia invado, en bonstata juda kuracista familio, kiu estas dissolvigonta: la gepatroj eksedziĝas (Rafi enmeze pasie amas sian panjon, kaj paĉjon li kore respektas). Ĉi tiu vivo kvazaŭ malaperas en la tempo, kaj ni baldaŭ lin retrovas, kiel li kun sia patro staras en Palestino antaŭ kibuco en la Valo (Emek Jezreel); tie komenciĝas la dua parto de lia vivo, la unuaj paŝoj en la maleolprofunda vojoto de la kibuca vojeto. La patro reiras for en urbon por trovi pozicion, la fileto, tiam ĉ. 10jara, devas trovi kontakton kun siaj grupanoj, kio estas ne

facila. Li trovas intiman amikecon kun hundo, sed la instruisto, konstatinte ke la nombro de la hundoj en la kibuco troiĝis, senkompatate jetas „Didi“n — sen scio de Rafi — sur forveturantan ŝarĝaŭtomobilon. Unu el la ekzemploj, kie manifestiĝas, ke utilpensado superas sentimentalecon.

La aŭtoro streĉas kelkfoje iomete tro la fantazion de la leganto, ekz. ke Rafi laŭŝajne ĉe sia alveno en la kibuco konas el la hebrea (ivrit) nur la vorton „ŝalom“, sed baldaŭ jam scias flue interparoli.

La tradukinto Ota Ginz faris bonan traduklaboron. Interese estas, ke li uzas oftege hebrean manieron de genitiv-formado (nomata gramatike: casus constructus), ekz. „sur muroj de la domoj“ (sur la), „en profundo de la nebulo“ (en la). Plue li, kiel bedaŭrinde ankaŭ aliaj tradukintoj, absolute neglektas la akuzativ-formon ĉe propraj nomoj, ekz. „mi petas Rafi“, „li vidas Uri“, „ni vokas Jael“.

Kial la libro titoliĝas „Freŝa mateno“? Nu, mi havas nur malfortan personan konjekton, kaj tial mi lasas la solvon ankaŭ al vi, kara leganto. Cetere, se vi volas ĝuste prononci la antaŭnomon de la aŭtoro, diru: Re-u-vén, kio signifas — Ruben.

Bona konsilo: Akiru la bele binditan, klare presitan kaj nigre-blanke ilustritan libron!  
**Joseph F. Berger**

## Brila gemo de nia liriko

**Hendrik Adamson: Vesperkanto.** El la materialo kolektita de J. Ojalo redaktis K. Kalocsay. Enkonduko de Hilda Dresen. 132 p. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1967. (STAFETO: Beletraj Kajeroj, 30.) 1,50 us. dol.

Hendrik Adamson apartenas al la t.n. Budapeŝta Skolo, sed ĝis nun ne eliris individua versvolumo lia. Liaj poezioj trovis indan lokon en la kolektiva verko „Dekdu poetoj“.

La fakto mem, ke 20 jarojn post lia morto aperas tiu ĉi kolekto kaj eĉ en redakto de Kalocsay, pravas, ĝis kia grado la poeto estas klasikulo de la lingvo.

La sorto ne montris sin favora al Adamson kaj frue li jam suferis sub la jugo de peza malsano, kiu al la nur mezaĝa poeto rabis la vivon. Tiuj personaj suferoj kaj internaj bataloj estis la movoforto, kiuj diktis al lia plumo. Sed lia poezio ne estas nur tenebraj kantoj saturitaj de vivotedo kaj malespero. Male, en ili troviĝas tre lumaj

korgojigaj momentoj. Ili vere estas fidela atestajo pri la eterna belo, kiu kaŝiĝas kaj riveliĝas en ĉiu vera poezio. Tre intime li pentras etajn epizodojn el la naturo kaj la kampara vivo, kiu estis la nutrogrundo de la poeto.

Sed malgraŭ la koŝmaro de obsedanta ftizo la poeto ankaŭ sonigas la kordojn de l' amo, kiel montras la ciklo „Sur citro citra“.

La manipulo de la metroj, de la versa tekniko montras altgradan talenton kaj samtempe studon super Baghy kaj Kalocsay. La perfekta elvokiveco de la sonsimbolika siaflanke aldonas por fari el la libro brilan gemon de nia liriko.

Se klasifi la libro apartenus al la t.n. ŝlifita romantiko kaj ne ankoraŭ necesigas metafizikajn cerbostreĉojn.

La bela antaŭparolo de Hilda Dresen estas kvazaŭ kremotufo sur bongusta kuko.

**Reinhard Haupenthal**

## Sur sudafrika fono

**Edwin de Kock: Fajro sur mia lango.** Poemaro. Prologo de Baldur Ragnarsson. 120p. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1967. (STAFETO: Beletraj Kajeroj, 29.) 1,50 us. dol.

Pasis sep jaroj inter la unua poemaro de E. de Kock „Ombroj de la kvara dimensio“ kaj la nuna. Jaroj de akirado de novaj spertoj surbaze de studoj kaj eksperimentoj, kiuj kondukis al tio, ke la poeto en la prozodia studo librofine jam parte revizias la siatempajn starpunktojn. Sed la simpatio al la troeko restas.

Detala okupiĝo pri liaj teorioj devus esti la tasko de pli ampleksa studo.

Al la siatempaj karakterizaj vortoj de M. Boulton aldoniĝas nun enkonduka eseo de B. Ragnarsson. Ambaŭ poetokolegoj ŝajne iel kunsupertis la forĝigon de la talento de de Kock, kiel atestas iliaj citoj el leteroj. Pri la metafora lingvo, kiun analizis Boulton, nun Ragnarsson povas konstati, ke „liaj imagoj ĝenerale fariĝis pli tuŝe konkretaj“.

La poezio de de Kock apartenas al la t.n. metafiziko kaj ĝiaj temoj estas tre vastgamaj. Multaj scenoj estas ne imageblaj sen la sudafrika fono kaj tiurilate de Kock iel anticipas formiĝontan afrikan poezion.

Lia lingvaĵo kaj pensabundo ne estas legajo frandebila en fotelo. Gi necesigas fortan atentostreĉon kaj kapablon ensentigi en liajn vortojn.

Estus interese vidi iam prozan beletraĵon de la poeto, kiu ebligus pli modlitajn juĝon pri lia fakta lingvomajstrado.

**Sciuro**

## Ranca ŝimodoro

**Margid Thoraes-Ekström: Brilo de fantomo.** Esperanta originalo. 72p. Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhoj, 1967. 7,50 d. kr.

La diskrepanco inter nia originala prozo kaj poezio estis ofte akcentita kaj estas ĝenerale konata. La feblon de la pratempaj prozajoj oni povus kompreni, ĉar tiam ĉio originala estis ĝoje salutata, eĉ se diletanta kaj fuŝa. Tamen hodiaŭ (ĝuste post kulminaj atingoj de Rossetti, Ribillard kaj Schwartz) ni devas mezuri per aliaj mezuriloj — per sobraj literaturkritikaj kriterioj. Aplikante tiajn, ni povas sen larĝaj eksplikoj tuj konstati, ke la nuna prozajo „Brilo de fantomo“ estas literature senvalora. Gi malbonodoras per ia ranca ŝimodoro de la plej trivialaj frutempaj prozverkoj. Gi povas nek klasifigi kiel fabelo (kvankam ja infaneca ĝi estas, sed neniel porinfana) nek kiel novelo nek malpli kiel romano. Ekstere ĝi prezentiĝas kiel kvazaŭa memkonfeso de unu sveda kampardevena virino al itala monaĥo (kiu adoras sanktulojn!). La rakontanta persono estas la rezulto de perforto de unu kruda bienulo al ties servistino, poste edzinigita. Sekvas pseŭdobio-grafiaj priskriboj, kiuj estas bunta mikso el sentimentalaj, fabelaj kaj romantikaĵaj rememoroj infanaĝaj.

La stilo estas ege infaneca, lernantina. Rakonta talento ne montriĝas. Kontraŭ tio eĉ la talismana kontrolmarko de SAT ne povas ŝirmi.

La verko estas rekomendebla eĉ ne kiel kursa legajo, se ne provoki kompleksojn ĉe la Esperantaj novicoj pri la nivelo de nia kulturo.

**R. H.**

## Por la paco

**P. Jacques Goettmann: Eklezio kaj milito.** Tradukis D-ro Klaus Perko. 39p. Eld. Ekumena Esperanto, Zürichersmühle, Svislando, 1967. 2 sv.fr.

Elirante de la encikliko „Pacem in terris“ de Papo Johano XXIII, la aŭtoro avertas kontraŭ iluzioj pri ties akceptiĝo, ĉar ankoraŭ regas „evidenta kontraŭdiro... inter la encikliko kaj la ĝenerala opinio de la kristanoj“. Li pledas por energia porpaca agado de la eklezio, por partopreno en pacmovadoj, kontraŭatom-marŝoj, neperfortaj agadoj, internaciaj kaj interkonfesiaj renkontiĝoj; sed tia agado ne estu „kontraŭa kruc-militiro“, sektismo aŭ unuflanka propagando kaj same ne klopodo „simple konservi la ekzistantan ordon“.

La pacostrategio de la evangelio (klarigata per multaj bibliaj citaĵoj), la penso de Johano XXIII („profeto de l' paco“) kaj la neperforta agado de Gandhi montras laŭ la aŭtoro la vojon al paca mondo. Leĝoj de tiu pactaktiko estu vero, libereco, justeco kaj karito.

Nomante kiel militkaŭzojn ĉefe profitavidon kaj regemon, la aŭtoro bedaŭrinde rezignas eniri la teologian „labirinton“ de la t.n. justa milito. Kiel ajn: Definitive pasis la tempo, ke episkopoj benas armilojn.

**U. L.**

# Annette Kolb mortis

Vivo en servo al german-franca interkompreniĝo

La plej aĝa germana verkistino, Annette Kolb, mortis en Munkeno la 3an de decembro 1967 en la aĝo de 97 jaroj. La aŭtorino, kies „animo havis du patrolandojn“ — kiel ŝi mem skribis, naskiĝis la 3an de februaro 1870 en Munkeno kiel filino de altranga bavara kortega oficisto kaj de lia franca edzino, pianistino kaj amikino de Cosima Wagner. Plenkreskinte en kosmopolita societo, ŝi utiligis multajn aŭtobiografiaĵojn en siaj romanoj *Das Exemplar* (1913), *Daphne Herbst* (1928) kaj *Die Schaukel* (1934).

Post la Unua Mondmilito la poetino konsideris urĝaj antaŭ ĉio la eŭropan interkompreniĝon kaj la german-francan repaciĝon. Tiun taskon servis ankaŭ ĉefa parto de ŝia esea verkado. „Dektri leteroj de german-francino“ estiĝis jam en 1917, meze de la milito. Ankaŭ la „Provoj pri Briand“ kaj la „Libro de plendoj“ apartenas al tiu temaro. Ŝia lasta libro eliris sub la titolo „1907—1964

— Tempobildoj“. Memoraĵoj aperis en 1960 sub la titolo *Memento*.

Ankaŭ ŝiaj amikoj apartenis kaj apartenas al ambaŭ landoj: René Schickele, Albert Schweitzer, Rainer Maria Rilke, Hofmannsthal, Giraudoux, M. Lichnowsky, Carl J. Burckhardt, Julien Green kaj la ambasadoroj Roland de Margerie kaj Wilhelm Hausenstein.

En la jaro 1933 la poetino forlasis Germanion protestante kontraŭ la naziismo kaj iris unue al Parizo, kie ŝi akiris ankaŭ la francan civitanecon. La militaj eventoj tamen devigis ŝin rezigni pri tiu domicilio. Annette Kolb vivis tiam en Usono, sed jam en aŭtuno 1945 revenis al Eŭropo.

Multnombraj honoroj kaj distingoj estis al ŝi asignitaj dum ŝia vivo, speciale dum la pasintaj dudek jaroj: ŝi estis nomita honora membro de francaj kaj germanaj akademioj, portis la insignojn de *Pour le mérite*, plej alta germana distingo por sciencoj kaj artoj, ricevis la Fontane-Premion, la Gerhart-Hauptmann-Premion, la Kulturalan Premion de Munkeno; la urbo Frankfurt en 1955 transdonis al Annette Kolb kiel tria virino la Goethe-Premion. En 1959 ŝiaj klopodoj pri la eŭropa unuiĝo kaj german-franca interkompreniĝo estis premiitaj per la Granda Meritkruco de Federacia Respubliko Germanio.

Eternan literaturan monumenton al Annette Kolb metis Thomas Mann per la figuro de Annette Scheurl en sia *Doktor Faustus*.



Aŭtoro, reĝisoro kaj aktoro — ĉio en unu persono, tio estis Bert Brecht (en la fono — kun Paul Dessau, kiu i. a. komponis la kantojn por „Patrino Courage kaj ŝiaj infanoj“). La teatra jaro 1968 pasas sub la signo de lia 70a naskiĝtago la 10an de februaro. En aĝo de 58 jaroj li mortis la 14an de aŭgusto 1956 pro korkolapso en Orienta Berlino. Brecht, filo de fabrikisto en Augsburg, komplete estis teatra homo: Ŝiajn kantojn (li aperigis plurajn poemvolumojn) li mem kantis akompane al gitaro. La rolojn de li verkitajn li ekzercis kun la aktoroj. Sian plej grandan teatran sukceson Brecht spertis per la „Trigroŝa Opero“. Gi atingis en 1929 en Berlino pli ol 250 prezentadojn kaj internacie konatigis lin kaj la komponiston Kurt Weill. Post dekdu fruktodonaj jaroj de verkado en ekzilo (en Skandinavio, Sovetunio, Irano kaj Usono) li revenis en 1945 al Germanio. Lia „Berliner Ensemble“ fondita en 1949 iĝis instrujo de moderna teatro.

## Kultura vivo

● *Du memoroj nun reviviĝis en la urbo Trier, fondita de la romanoj en la jaro 15 a. Kr.: pri la romia epoko memorigas vilao, kies mozaika planko kaj muroj — pentritaj per ornamaĵoj kaj ĉasprezentoj — estas nuntempe elfosataj; la tempon antaŭ 100 jaroj, kiam disvolvis sian instruon Karl Marx naskita en Trier, oni memoras okaze de la preparoj je lia 150a datreveno, solene celebrotata la 5an de majo.*

● *La germanaj premieroj de „Biografie“, la nova dramo de Max Frisch, sekvos tuj la premieron en Zürich (1-2-1968): la 3an de februaro en Munkeno, Frankfurt kaj Düsseldorf. Poste oni prezentos en Karlsruhe, en marto en Berlino.*

● *La Kabaretaj Tagoj de Essen, ĉiujare okazantaj en la tiuurba junulara centro kaj prezentantaj al fakuloj novajn talentojn, okazos en 1968 de la 26a ĝis 28a de aprilo. La moto: „Rendevuo kun la Deko Muzo“. La deziro de la gvidanto Hans-Dieter Hüsck: „Engaĝita, konkreta, riska kaj eksperimenta kabareto.“*

● *„La sovetiaj verkistoj antaŭas la politikon“, diris Marov Ĥatov, kiu antaŭnelonge kune kun 13 aliaj verkistoj el Sovetunio travojaĝis la Federacian Respublikon. La opinio diriĝis en Bonn, kie estis parolate pri la ebleco de pli bona interkompreno de la du popoloj.*

● *El siaj libroj recitas* Stefan Andres, germana romanverkisto loĝanta en Romo, dum trimonata vojaĝo tra ok aziaj landoj.

● *La unua Muzeo pri Islama Arto* en Germanio estis malfermita en Okcidenta Berlino. La 321 selektitaj pecoj, kiuj provizore montriĝas kaj kovras tempon de la 2a jarcento a. Kr. ĝis la 17a jarcento, tamen nur formas 15% de la tuta havaĵo. Ĝi povos esti ekspoziciata nur post pretiĝo de la granda Muzeo pri Azia Arto en la urboparto Dahlem. — La Araba Ligo donacis al la Muzeo luksan eldonon de la Korano.

● „*La Venĝanto*“, bronza figuro de Ernst Barlach el la jaro 1914, nun estis akirita de la londona Tate-Galerio. Estas la unua verko de Barlach akceptita en angla publika kolekto.

● „*Ĉeĥoslovakio hodiaŭ*“ — sub tiu titolo Heslanda Radio en la semajno de la 14a ĝis 20a de januaro elsendis specialan programon kun ĉ. 70 eroj. Similajn elsendojn la Radio pli frue havis pri Hungario, Svedio kaj Belgio. La programo enhavis temojn el politiko, ekonomio, lernejo kaj universitato. Krome ĝi prezentis koncertojn, radioludojn, felietonojn kaj portretojn, plie diskuton inter germanaj kaj ĉeĥoslovakaj ĵurnalistoj kaj dokumentadon pri la evoluo de la rilatoj inter ŝtato kaj verkistoj en ĈSSR. En la tria programo de Heslanda Televido aperis raporto pri Prago, gastludo de la Rokoko-Teatro el Prago kaj unu filmulo.

● *Lerni la vaskan lingvon* ekster Hispanio oni povas — krom en Bordeaux — nur en la Universitato de Tübingen, kie Prof. D-ro Antonio Tovar, antaŭe rektoro de la Universitato de Salamanca, nun komencis kurson. Li jam delonge instruas en Tübingen komparan lingvistikon. La esploro de la vaska lingvo jam pli frue estis iniciatita en Germanio; antaŭ pli ol 30 jaroj Prof. D-ro Bouda malfermis katedron pri la vaska en Berlino.

● *Vickanceliero Willy Brandt* sciigis al la prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, Umberto Stoppoloni, ke li „ja scias apreci la popolligajn klopodojn de ĉiuj adeptoj de Esperanto kaj deziras al ilia agado ankaŭ estonte sukceson“.

## Pentekoston en Munkeno



De la 31a de majo ĝis la 3a de junio 1968 la bavara ĉefurbo gastigos la 46an Germanan Esperanto-Kongreson. Por eksterlandanoj la partopreno estas senkosta; tamen necesas pleniĝo de aliĝilo, kiun oni petu de la LKK (Horst Spirat, D-8 München 25, Postfach 546).

La programo enhavas i.a. gvidon tra la urbo, labor-kunsidojn, prelegojn, podian diskutadon, balon, vesperon kun bavara folkloro kaj ekskursojn. Postkongresa ekskurso tritaga kondukos ĝis Salzburg (Aŭstrio); prezo por veturo kaj tranoktado 70 GM.

Apartaj programeroj okazos por infanoj.

## Kiel malvenkigi Esperanton

### La verdstela metodo

Sub la titolo „Kiel venkigi Esperanton“ dum la pasinta jaro *Germana Esperanto-Revuo* aperigis plurajn kontribuojn, kiuj traktis i.a. la metodojn modkantistan, revolucion, verdgvardian, malsatstrikan ktp. Vidinte ke liaj sugestoj havis efikon tute malan al la intenco, nome rikoltis riproĉojn pro stulteco, defetismo kaj detrua kritiko, la aŭtoro — Kanguruo — decidis montri en nova serio, kiel oni povas malutili al Esperanto pli efike ol per satiroj pri la senĉesaj novaj metodoj, kampanjoj, iniciatoj...

En n-ro 1/68 de *GER* do aperis la unua metodo „Kiel malvenkigi Esperanton“, la grupkunvena. Sed ĝi restis la lasta en tiu organo, ĉar la redaktoro(j) cedis al ultimato kaj maldungis la kompatindan satiriston.

Des pli ni ĝojas, ke Kanguruo decidis daŭrigi sian serion en *OGR*. Jen do la dua metodo de la dua serio. Pro malbonaj spertoj ni rapidas atentigi, ke temas ankaŭ estonte pri satiroj; kian celon ili sekvas, niaj elitaj legantoj sendube tuj rimarkos.

\*

*Se oni volas malvenkigi la Internacian Lingvon (kaj mi estas certa, ke multaj el miaj gelegantoj tion volas, senkonsidere pro kiaj kaŭzoj), do oni nepre devas ĉiamaniere ridindigi kaj kompromiti la Esperanto-movadon. Por tion fari ekzistas diversaj ebloj, sed unikan helpon en tio ofertas la simbolo de tiu movado — la verda stelo. Se vi bone pripensas la aferon, vi certe konsentos al mi: La verda stelo estas kiel iu tipo de kemiaĵoj: Modera dozo efikas kiel medikamento, sed tro forta uzado estas venena. Ja, kelkefoje la verda stelo estas verda veneno — por mortigi ĉian estimon kaj respekton por Esperanto.*

*Por veni al praktikaj konkludoj: Se vi volas ridindigi Esperanton kaj senvalorigi ties insignon, tiukaze donu la verdan stelon al ĉiu persono, kiu iam komencis lerneti la lingvon. Estos tre bona malpropagando, se iu volas aŭdi de tiuj personoj iun frazon en la tutmonda lingvo, kaj lin renkontas absoluta nescio de tiu verda idiomato. Tamen, ne estu ekstremisma: Almenaŭ du frazetojn devus scii ĉiu portanto de verda stelo: „Bonan tagon, samideano!“ kaj „Ĝis revido, samideano!“*

*Ekzistas alia bona maniero mise uzi la verdan stelon: Oni ornamu per ĝi la kunvenejon de la grupo aŭ klubo, ĉefe dum Zamenbofaj festoj kaj simile. Iam mi ĉeestis feston de grupo, kiu sukcesis ornamu la muron de sia salono per 13 gigantaj verdaj steloj (tre mallerte tranĉitaj el kolora papero). Tio ĝis nun estas absoluta rekordo. Kiu grupo sukcesos superi ĝin? Sciu, ke tio faras tre bonan malfavoran impreson: Se neesperantano envenas tian salonon, li tuj estas kaptita de malagrabla sento; li iel suspektos, ke jen kunvenas la sekto de steladorantoj aŭ iu sekreta mistika esotera rondo. Krome tia amasiĝo de verdaj steloj tre taŭgas por detruu respekton antaŭ nia afero ĉe oficialaj reprezentantoj de kulturaj instancoj, gazetaj raportistoj, gimnaziaj profesoroj kaj aliaj malsatindaj personoj.*

*Tre bone ankaŭ taŭgas la stelo sur verda flago. Ekzemple, dum iu kunveno, renkontiĝo aŭ kongreso, oni nepre metu tian flagon sur la oratoran katedron, fiksu ĝin plue sur la frontmuro de la salono, kaj (se oni feliĉe posedas tiom da flagoj) ankaŭ sur la*



En florula ĉemizo kaj minijupo antaŭnelonge prezentigis en Munkeno alloga kortego. La ĉi-apartenaj gregantoj: Princino Karin I (maldekstre supre) kaj Princlino Peter I (dekstre supre), la ĉijaraj karnavalaj mostoj de la bavara ĉefurbo. La ideriĉaj kostumoj de Heidi, Sabine, Bibi kaj Brigitte estas rapide faritaj: Bikino, ŝtrumpa pantalone, tulo kaj floroj de kapo ĝis piedo — jen preta estas karnavala florulo. Kiu volas malpli okulfrappe tradanci la karnavalajn balojn en Kolonjo, Mainz aŭ Munkeno, tiu en 1968 sin ĉirkaŭvolvas per divankovraĵo aŭ buntega bantuko. Dum la „frenezaj tagoj“ apud Isar kaj Rejno permesite estas, kio plaĉas. Kiel longe daŭras tiu konfuzo? Ĝis la 28a de februaro 1968! Ĉar: „En Cindromerkredo ĉio pasis“, kiel tekstas ŝatata karnavala kanto.

aliaj muroj. Nespertaj vizitantoj tiel tuj povas suspekti, ke jen kunvenas iu radikala fanatika movado, kiu elmontras sian adoratatan emblemon, kiel ekz. faŝistoj, komunistoj, maŭistoj ktp. Kaj se tiuj vizitantoj ekmalŝatos la Esperanto-movadon: Jen nia celo jam estas atingita.

Ekzistas ankoraŭ multaj taŭgaj vojoj por (mis)uzi la verdan stelon. Tuj aĉetu kaŭĉukan stampilon kaj stampu la stelon sur viaj leterkovertoj! Sed ne nur unu stelon, mi petas, sed minimume kvin. Plej bone estas stampi la stelon sur leterojn aŭ poŝtkartojn al neesperantistoj. Kara sinjoro, ĉu vi jam havas manumbutonon kun la verda stelo? Kara sinjorino, ĉu vi jam portas kolĉenon kun tiu sankta signo? Ja, antaŭ dudek jaroj la junularo ankoraŭ estis progresema: Tiam iu germana grupo venis al kongreso junulara, kaj ĉiuj portis saman verdan ĉapeton kun blanka rondo enmeze, kiu siavice enhavis la amatan stelon. (Al la hodiaŭa junularo esperanta tute mankas tia entuziasmo!) Se vi posedas aŭton, vi ja certe scias kaj konscias, ke unu modesta steleto estas tro malmulte. Ho, sur ĉiu flanko, pordo kaj fenestro de via veturilo devas esti minimume unu ĝis du belaj grandaj, tuj videblaj steloj.

Karaj gesamideanoj! Havu fantazion! Pripensu mem, kien vi ankoraŭ povas meti la verdan stelon! Memoru la alvokon de Raymond Schwartz, laŭ kiu la verda stelo estu „en butontru“, en nazotru“, en trulala kaj tiel plu...“. Sur ĉiuj niaj libroj, revuoj, broŝuroj, jaldfolioj, kongresanaro-adresaroj, glumarkoj, kotiz-kvitancoj, kunven-invitoj, kurslecionaroj, kongres-aligiloj ktp. ktp. ktp. — ĉie devas esti nia kara verda stelo. Sen tiu stelo nia lingvo ne povas ekzisti! Kaj bone sciui: Sen troa uzado de tiu stelo ni neniam sukcesos sufiĉe ridindigi nian aferon. Eke al laboro!

Kion vi respondas, kara leganto? Vi nur posedas unu malgrandan modestan stelinsignon? Vi ne scias, kiel alie uzi nian gloratan emblemon? Hontu, bontu! Kaj por ke venu al vi novaj ideoj, ĉium vesperon mallaŭte preĝu antaŭ enlitiĝo la belan poemon de nia fama kaj elstara poetino Marie Hankel:

„La bela verda stelo | Kviete brilas jen | Ĝi estas alta celo | Allogas nin kien? | Steleto kara mia | Kion do volas vi? La brila lumo via | Kion alportas ĝi...“ Kaj certe dum la sonĝo venos al vi novaj ideoj, kiamaniere misuzadi la verdan stelon, por ke finfine malvenku la Internacia Lingvo.

Kanguruo

## „Religioj kaj filozofio en la 20a jarcento“

Sub tiu titolo sukcese pasis la 11a Internacia Seminario (IS) de Germana Esperanto-Junularo en Würzburg (27-12-1967 ĝis 3-1-1968). Okazis la anoncitaj (OGR 4/67) prelegoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna, S. Maul, F. Moravec, G. Lagrange kaj Ib Schleicher. Detala raporto troviĝos en la marta numero de *Germana Esperanto-Revuo*.

Apartan atenton elvokis du arangoj en la Universitato de Würzburg: Publika prelego de Prof. Lapenna pri „La nun-

tempa soveta koncepto pri ŝtato kaj juro“ kaj podia diskuto pri la demando „Esperanto en la universitatojn?“. En tiu lasta partoprenis la lokaj profesoroj Theodor Berchem (latinidaj lingvoj) kaj Max-Martin Scheer (fiziko) kaj flanke de la IS Prof. Lapenna, D-ro Victor Sadler kaj John C. Wells. La konkludon, ke Esperanto estas disvastiginda en sciencaj medioj, ankaŭ subtenis Prof. D-ro Heinz Fleckenstein, rektoro de la Universitato, dum akcepto de la diskutintoj kaj 80 seminarianoj el 15 landoj.